

BULGARA



ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

En la numero:

LA BALKANOJ —
ZONO DE PACO

•
AL PLUA
PERFEKTIĜO!...

•
BUDAPEŝTAJ
KONGRESAJ
IMPRESOJ

•
TEJO EN
PERSPEKTIVO


•
ELISAVETA
BAGRJANA —
90-JARA

•
LA MONDO
DE MAYNE REID

•
NI RECENZAS

•
ENLANDA MOVADO

•
FABELA ROKMONDO



LA BALKANOJ — ZONO DE PACO

La iniciato de Bulgario pri entrepreno de politikaj paŝoj por transformi la Balkanojn en zonan de paco, liberan de nukleaj armiloj, esprimas la pacaman politikon de nia socialisma lando. La prezidanto de Stata Soveto Todor Jivkov deklaris, ke „Popola Respubliko Bulgario faris kaj plu faras ĉion eblan por evoluigo de siaj rilatoj kun la Balkanaj landoj, por firmigo de la paco kaj bonnajbareco“.



La sennuklearmila zono de la Balkanoj devas respekti la ĉefajn politikajn kaj internacijurajn postulojn, karakterizajn pri tiuj zonoj, konsiderante la specifaĵojn de politika kaj militstrategia naturo. Ĉi-tie troviĝas ŝtatoj, kiuj partoprenas en la du milit-politikaj aliancoj -- la Varsovia Kontrakto kaj Nordatlantika Alianco (NATO), kaj ankaŭ tiaj, kiuj ne membras en ili. La fakto, ke tra la Balkana Duoninsulo pasas la linio de intertuŝigo inter la du milit-politikaj organizaĵoj, atribuas apartan aktualecon al la iniciato pri starigo de zono, libera de nuklearmiloj. Tiumaniere oni malhelpas la enkondukon de nuklearmiloj en regionon, kiu havas gravan politikan kaj milit-strategian signifon.

La formiĝo de regiona sistemo por sekureco pere de la reĝimo de sennuklearmila zono neeviteble provokos la kreon de favoraj premisoj por evoluo de bonnajbaraj rilatoj de amikeco kaj kunlaboro. La Balkanoj havas intereson utiligi siajn relative limigitajn naturfontojn kaj ekonomian potencialon por la realigo de vastaj mastrumaj kaj socialaj programoj en la

kondiĉoj de stabilaj rilatoj kaj reciproka sekureco.

Sendepende de iuj malfacilaĵoj ekzistas favoraj kondiĉoj por transformi la Balkanojn en sennuklearmilan zonan. La partopreno de la plimulto de balkanlandoj en la du milit-politikaj aliancoj estas fakto, kiu ne povas esti ignorita. Tamen per si mem ĝi ne estas nesuperebla obstaklo de politika kaj jura karaktero, ĉar la kreo de sennuklearmila zono ne devigas la balkanŝtatojn forlasi la ekzistantajn milit-politikajn blokojn.

La praktika realigo de la iniciato pri transformiĝo de la Balkanoj en sennuklearmilan zonan estas neeviteble ligita kun la koncernaj politikaj kaj diplomaciaj preparlaboroj. En ili klariĝos la politikaj, militstrategiaj kaj internaci-juraj aspektoj de la reĝimo de sennuklearmila zono, por ke oni forigu la eventualajn dubojn kaj prokrastojn.

La bulgara Komitato pri Balkana Kunlaboro diskonigis deklaron, en kiu oni bonvenigas kaj senrezerve subtenas la ideon pri libera de nuklearmiloj zono de paco kaj deklaras, ke „per ankoraŭ pli granda insistado ĝi donos sian kontribuon al la fortostreĉoj por preventi la Balkanan Duoninsulon de la teruro de ebla termonuklea katastrofo“. Kreskas kaj plimultiĝas la movado por kreo de sennuklearmila zono en la Balkanoj. Sociaj organizaĵoj, sciencistoj, verkistoj kaj ĵurnalistoj, kreantoj de belliteraturo kaj artoj, industriaj laboristoj volonte adoptas la ideon kaj aliĝas al la movado por la paczono.

La balkanpopoloj konas la militan tragedion eble pli ol multaj aliaj popoloj. Ili vidis en la nuna jarcento la Unuan kaj Duan Balkanmilitojn, ili portas la vundojn de la Unua kaj Dua Mondmilitoj. Kaj ili havas la konscion, „ke se en la Balkanoj ekflamas termonuklea konflikto, niaj landoj kun ĉiuj iliaj naciaj, religiaj, ideologiaj kaj politikaj diferencoj brulus kiel unu komuna torĉo“ (Todor Jivkov). Kun tiu sense konsciita vero batalas la balkanpopoloj. Pro ties propraj suferoj kreskas ilia decidemo defendi la pacon en la Balkanoj kaj en la mondo.

La balkanaj esperantistoj, kiuj okazigis en oktobro ĉi-jare sian konferencon en Bankja (Bulgario), subtenas la paciniciaton de nia lando pri sennuklearmila zono kaj pretas insisti, por ke la pacama ideo realiĝu en intereso de la kolektiva sekureco kaj bonnajbareco de la balkanlandoj.

EVGENI GEORGIEV



BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

JARO 52

OKTOBRO

10 • 1983

AL PLUA PERFEKTIĜO!...

Ekestis denove la sezono por intensa kulturkaj studlaboro. Ekfunkciis kursoj. Jam en multaj lokoj oni organizas duagradajn kursojn, konversaciajn rondojn, amatorajn artgrupojn. Ĉiuj ĉi formoj kontribuas por nia lingva perfektigo, por pliprofundigo de niaj scioj. Jam naŭan jaron funkcias la triagrada instrusistemo kaj la rezultoj montras, ke ĝi multe helpis por plialtigo de la lingva nivelo. La kvalito de la instruado mem plialtiĝis, ĉar ni jam posedas centojn da spertaj, diplomitaj Esperanto-instruistoj.

Tamen malbonon por la movado prezentas la malobservo de la Regularo pri la Kursoj. La regularojn oni ellaboras kaj akceptas por pli bone kaj rezultoplene funkciigi iun ajn sektoron de nia laboro. Tiurilate la Regularo pri la Kursoj ludas pozitivan rolon kaj ĝia rompo estas riproĉenda kaj punenda.

Laŭ la Regularo nur la estraro de la Instruista Sekcio rajtas aranĝi superajn kursojn (III grado) kaj klasojn por instruarĵto. Malgraŭ tiu tre klara postulo, en kelkaj distriktaj organizaĵoj oni aranĝis kursojn kaj eĉ ekzamenon. Rezulte la kursanoj ricevis atestilojn, dum laŭ la Regularo ili ricevas diplomon (ĉar tio estas fino de la kursa lingvolernado) laŭ speciala modelo kaj kun centra numero, registrita en la centra registro de la Instruista sekcio kaj en la kartoteko. Nun la kursanoj konstatas, ke estas trompitaj. Similaj kontraŭdisciplinaj agoj kompromitas antaŭ ĉio la lokajn organojn de la Asocio, sed ili malbone influas ankaŭ la movadon ĝenerale. Bedaŭrinde, personoj kaj organoj, kiuj okupiĝas pri la instruado de Esperanto, konas nek la Regularon, nek la oficialajn programojn. Feliĉe, baldaŭ la Regularo kaj la programoj aperos en aparta broŝuro kaj tiam ni esperu, ke rezulte ĉesos por ĉiam la tute nepravigeblaj deflankigoj de ili.

Nia instrusistemo estas bona, ĝi donis siajn

fruktojn, sed ni devas severe observi la bazajn dokumentojn, se ni deziras ricevi maksimumajn rezultojn.

Tamen kun bedaŭro oni devas noti, ke la lingva nivelo de la plimulto de la bulgaraj esperantistoj ne estas sufiĉe alta. Oni ne povas perfektigi nur en la kursoj. Tie la kursanoj ricevas nur bazajn konojn por povi poste sukcese pliperfektigi. Tio povas okazi per konstanta praktikado, korespondado, legado de gazetoj kaj libroj, parolado. Ni ne ĉiam troviĝas en esperantista medio. Pro tio ni devas utiligi ĉiun eblecon por konversacii en Esperanto. Guste pro tio funkcias la E-klubejoj, por ke la societoj liveru al siaj membroj eblecon paroli kaj aŭskulti Esperanto-parolon. Bedaŭrinde, tie oni ofte „krokodilas“ ne nur ekster kunvenoj, sed eĉ dum kunvenoj. Kaj tiamaniere la societoj perdas siajn membrojn, kiuj aliĝas por praktiki la lingvon. Iuj estraroj sub preteksto, ke ĉeestas novaj esperantistoj, donas verdan straton al la nacilingva parolado. Sed novaj esperantistoj estas kaj estos ĉiam. Kaj ĝuste la novaj plej multe bezonas aŭskulti la lingvon kaj peni partopreni en konversacioj. Ni observis kian ĝojon spertas ĵus finintaj komencan kurson, kiam ili povas partopreni en konversacio. Kaj tiuj plej rapide progresas. Ni devas restarigi la tradician praktikon paroli en Esperanto ne nur en kunvenoj, sed en ĉiuj E-aranĝoj (konferencoj, seminarioj, amikaj renkontigoj, ekskursoj, amuzvesperoj ka.). Kaj ĉie, kie estas du aŭ pli da esperantistoj, la konversacio realiĝu en Esperanto! Kaj precipe la gvidantoj devas doni ekzemplon kaj instigon. Alimaniere ni ne havos esperantistojn, flue kaj elegante parolantajn la lingvon.

Se ni deziras efektive (ne nur per sloganoj kaj bondeziroj) altigi la lingvan nivelon de niaj membroj, ni devas esti netoleremaj al la krokodilado, ĉiutage persiste batali por konstanta praktikado kaj pliriĉigo de la lingvo.



68a universala kongreso de esperanto

ESPERANTO SONIS ĈE LA BORDOJ DE DANUBO...

BUDAPEŬTO — DUAN FOJON ĈEFURBO DE UK DE ESPERANTO

Budapeŝto — la ĉefurbo de Hungara Popola Respubliko, estas nomata „perlo de Danubo“, „reĝino de la pontoj“. . . Kaj kiu scias kiom da aliaj trafikaj nomoj donas al ĝi tiuj, kiuj, vizitante ĝin, ĝuas la mirinde belan multvizaĝan metropolon de Mez-Eŭropo, ĉirkaŭprenantan ambaŭ bordojn kaj la insulojn de Danubo.

Dum jarmiloj ĝi estas vojkruciĝo de historiaj epokoj, zorgema konservanto de ties arkitekturaj trezoroj: konstruaĵoj de la antikva romia urbo kaj de la periodo de la turka konkero, monumentoj kaj majstroverkoj de la Renesanco. . . Kaj la nuntempa urbo karakteriziĝas per evoluinta industrio, per novaj modernaj

kvartaloj kaj per sia riĉa kultura kaj socipolitika vivo.


De la 30-a de julio ĝis la 6-a de aŭgusto ĉi-jare (duan fojon post la 21-a UEA-Kongreso en 1929), Budapeŝto denove estis ĉefurbo de Universala Kongreso de Esperanto — de la 68-a UEA-kongreso, kiun partoprenis pli ol 5000 kongresanoj el ĉiuj partoj de la kvin kontinentoj. Ĝi estis la plej amase vizitita kongreso en la tuta historio de la E-movado.

La kongresejo — la grandega moderna rondforma konstruaĵo ĉe la Nacia Stadiono (Népstadion) meze de la urbo — estis la centro de plej amasaj aranĝoj kaj renkontiĝoj dum unu semajno.

La 31-an de julio, je la 10 horo, en la plena de kongresanoj amfiteatra halo ĉe la stadiono en ĉeesto de la oficialaj gastoj estis solene malfermita la 68-a UK de Esperanto.

Per korvarmaj vortoj la Alta Protektanto de UK **Sándor Gáspár**, vicprezidanto de la Prezidio de la Hungara Popola Respubliko kaj ĝenerala sekretario de la Landa Konsilio de Hungaraj Sindikatoj salutis la kongresanojn kaj bondeziris la ili rezultoplenan laboron kaj agrablan restadon en Budapeŝto. „ . . Ni konsideras la Esperanto-movadon — li diris — kiel unu el la plej noblaj movadoj dum la lastaj jardekoj. Ĉiun honestan, bonintencan homon entuziasmigas la rezulto de lia laboro. Multe pli tio rilatas la kulturantojn de Esperanto, kiuj povas vidi la rezulton de sia laboro. . . “

Lige kun la proklamo fare de UN de 1983 kiel Monda Jaro de Komunikado, la ĉefa kongresa temo elektita de UEA por 1983 estas: „Sociaj kaj lingvaj aspektoj de la moderna komunikado“, kiu devis esti pridiskutata dum la ĝenerala



kunvenoj. Grava startpunkto estis la prelego de s-ro R. E. Butler, ĝenerala sekretario de Internacia Telekomunika Unio (ITU).

Post la salutparoloj de diplomatiaj reprezentantoj de diversaj ŝtatoj en Hungario, la prezidanto de UEA s-ro Grégoire Maertens prezentis la novelektitajn membrojn de la UEA-estraro: prof. d-ro Humphrey Tonkin kaj Yosimu Umeda — vicprezidantoj, s-ino Flóra Szabo-Felső — ĝenerala sekretario; estraranoj: d-ro Renato Corsetti, Barbara Despiney, Roland Lindblom, Baldur Ragnarson, Petâr Todorov.

Kiel kutime, sub la kongresa verdstela standardo sonis solenaj Esperanto-kantoj, kiuj pliriĉigis la agrablan internacian kaj fratan etoson.

Komenciĝis la neforgeseblaj, streĉitaj, enhavoriĉaj kaj agrablaj sep kongresaj tagoj!...

* * *

La Hungara Nacia Vespero estis la komenco de variaj kongresaj programeroj, kiujn ĝuis miloj da kongresanoj. Gravan kontribuon por ĝia aranĝo havis s-ino Ēva Farkas-Tatár, membro de LKK. Literaturaĵoj de eminentaj hungaraj verkistoj kaj poetoj, muzikaĵoj en klasika stilo kaj fine... la viglaj, frenezigaj hungaraj popolaj „Csardas“-dancoj kaj kantoj, plenumitaj de la Folkloro Ensemblo „Bem“ sub la arta gvidado de d-ro Edréné Oskó.


Estas tre malfacile prezenti ĉiujn aranĝojn de la kongresa programo — tiom abunda kaj riĉa ĝi estis! Menciindaj tamen estas tiuj, kiujn partoprenis la bulgaroj. Kiel kutime ili estis inter la plej agemaj kongresanoj!...

JUBILEA MEM-KUNVENO

Geesperantistoj-pac batalantoj — pli ol 300, renkontiĝis la 2-an de aŭgusto en la granda salono „Kalocsay“ por celebri la 30-an jubileon de la Mondpaca Esperanto-Movado kaj esprimi sian firman decidon per ĉiuj fortoj kaj kapabloj defendi la mondan pacon, batali kontraŭ la minaco de nuklea milito.

D-ro Imré Péthes — prezidanto de MEM, bonvenigis la senditojn de Romesh Chandra — prezidanto de la Mondpaca Konsilio, kaj dankis pro lia mesaĝo al MEM. Kancize, sed enhavoplene parolis Michella Lipari el Italio, G. Du Temple el Kanado, Magomet Isaev el Sovetunio, Zdenko Křimski el ĈSSR kaj multaj, kiuj emfazis la danĝeran mondsituacion kaj la realan minacon de neniigo de la homa civilizo. Ili montris konkretajn agojn kontraŭ la vetarmado kaj rekomendis pli aktivan kunlaboron inter la pacamaj fortoj en la tuta mondo, sendepende de iliaj politikaj kaj religiaj opinioj.

Inter la ĉeestantoj estis multaj bulgaroj, kiuj aktive partoprenis la jubilean MEM-kunvenon kaj vigle subtenis la faritajn proponojn.



La kongresejo

SUKCESPLENA JARKUNVENO DE ILEF

La 1-an de aŭgusto „je la 17.30 h. en salono „Baghy“ la Internacia Ligo de Esperantistaj Foto-Kino-Magnetofon-Amatoroj (ILEF) okazigis sian regulan jarkunvenon.

La prezidanto de la ligo Donĉo Hitrov raportis pri ĝia aktivado dum la pasinta organiza jaro. Li substrekiis, ke la organiza kaj la krea aktivado de la organizaĵo ĉiam pli kaj pli stabiligas.

Estis vigle pridiskutitaj la du gravaj projektoj de la Estraro — la kreo de plenlonga kolora dokumenta 16-mm filmo pri la 100-jariĝo de Esperanto kaj la organizo de Internacia Esperanta Filmoteko ĉe la Internacia Muzeo de Esperanto en Vieno. La du projektoj, afable aprobitaj fare de la Estraro de UEA, postulas multan tempon, fortojn kaj sindonemon de ĉiuj membroj de ILEF, sed ili estas pretaj dediĉi sin al la efektivigo de tiuj noblaj taskoj. La kunvenon ĉeestis ankaŭ la vicprezidanto de TEĴA (Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio) Ivan Keremiĉiev-Esperov, kiu parolis pri la rezultodona aktivado kaj kunlaborado de ILEF kaj TEĴA, kiuj unuigis dum komuna kunsido en Antverpeno pasintjare.

INTERNACIAJ FOTO-KINO-MAGNETOFON-KONKURSOJ

Dum la kongresaj tagoj ILEF aranĝis en unu el la haloj de la kongresejo Internacian Fotoekspozicion-konkurson pri temo „La folkloro arto — ponto inter la popoloj“.

La unua premio — por kompleta manifestiĝo de alta artnivelo — estis aljuĝita al Ivet Georgieva (Bulgario), duan premion ricevis Emilia Kirilova (Bulgario) — por plej trafa prezento de la konkursa temo en sia foto-kolekto, kaj trian premion la ĵurio aljuĝis al Lada Milkova (Bulgario) por ŝia kolekto

„Niaj infanoj — nia espero, nia estonto“. Du kuragigaj premioj estis aljuĝitaj al Jovan Oŝap (FRG) kaj al Venelin Viŝki (Bulgario). Pri la sama temo okazis ankaŭ internaciaj kino-kaj magnetofon-konkursoj. La unua premio per filmo estis aljuĝita al s-ro Kaoru Asaoka el Japanio por lia kolora dokumenta filmo „Vilaĝa festo“ de la nomo de s-ro José F. Arroyo el Madrida Esperanto-Liceo, Hispanio, estrarano de ILEF pri Kino kaj Foto por Okcidenta Eŭropo kaj por Norda kaj Suda Ameriko. La premio pro kolekto el diapozitivaj oni aljuĝis al s-ro Petko Arnaudov — Bulgario.

TEJA AKTIVIGAS

Multsignifa estas la fakto, ke en salono „Szaŭl mari“, kie la 5-an de aŭgusto j. k. la Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio (TEJA) okazigis sian raport-elektan jarkunvenon, estis nek unu libera loko kaj multaj el la pli ol 80 partoprenintoj staris por aŭskulti la raporton de la prezidanto de TEJA — s-ro Olav Thormodsen (Norvegio).

Koncize kaj objektivite s-ro Thormodsen priskribis la ĝisnunan aktivadon de TEJA. Li menciis, ke ĝi ne estis je tia nivelo, kian postulas ĝiaj gravaj kaj respondecaj taskoj kaj substrekis la urĝan neceson pri renovigo de la estraro kaj plivigligo de ties agado.

La vicprezidanto de TEJA — Ivan Keremiĉiev-Esperov (Bulgario) tralegis la projekto-proponojn de la estraro de TEJA pri la estonta agado dum ĝia trijara mandato, kiuj antaŭvidas variajn aranĝojn por plimultigo de la membraro de TEJA, por plibonigo de la eksteraĵo de la asocia organo „Internacia Ĵurnalisto“ kaj por pliriĉigo de ĝia enhavo per interesaj profesie verkitaj materialoj,

por plifortigo de la kunlaborado kun la unuiginta kun TEJA Internacia Ligo de Foto-Kino-Magnetofon-Amatoroj (ILEF).

La diskutadon de la raporto kaj de la projekto-proponoj vigle partoprenis multaj el la ĉeestantaj TEJA-anoj kaj ILEF-anoj el diversaj landoj. Estis rekomendite, ke la estraro de TEJA nepre plibonigu la eldonadon de „Internacia Ĵurnalisto“ per traktado de temoj, proksimaj al la ideologiaj konceptoj de ĉiuj membroj de TEJA kaj ILEF: humanaj problemoj, problemoj pri konservo de la monda paco kaj protektado de la naturo.

Post viglaj diskutoj estis elektitaj novaj estraranoj: Walter Haberl (ĉefredaktoro de „La Socialisto“ — Aŭstrio) — prezidanto, Donĉo Hitrov (Bulgario) — ĝenerala sekretario kaj Danuta Jakubiec (Pollando) estrarano.

INTERNACIA SOMERA UNIVERSITATO

En la Internacia Somera Universitato prelegis profesoro Hristo Marinov pri temo: „Ekologia „futurologio“ — teorio kaj praktiko“, kiu vekis grandan intereson ĉe la partoprenantoj. En la jarkunveno de IPTEA ĝia prezidanto Draguŝko Petrov altiris la atenton per sia prelego pri la kongresa temo, kiu estas ege proksima al la celoj de la organizaĵo de telekomunikistoj. Multaj bulgaroj partoprenis la fondaĵon kunsidon de la Esperanta Verkista Asocio, kies prezidanto fariĝis Tibor Sekelj (Jugoslavio), kaj la seminarion de Literatura Foiro en la biblioteko „Maksim Gorkij“ en Budapeŝto.

KUNVENO DE LA VIRINA KOMISIO

Speciale aktiva estis la partopreno de la bulgarinoj en la kunveno de la Virina Komisiono, kiun ĉeestis pli ol 120 virinoj el diversaj landoj. S-ino Julie Tonkin (Usono) rakontis pri la seminario-renkontiĝo en la Internacia Esperanto-Kursejo en Pisanica (Bulgario), okazinta antaŭ la kongreso. En la kunveno regis unu granda sento, unu granda deziro (samkiel en ĉiuj ceteraj kunvenoj de la kongresanoj): labori obstine — per ĉiuj fortoj kaj rimedoj por konservo de la monda paco.

Agrabla kaj kortuŝa estis la akcepto de partoprenantoj en la kunveno de la Virina Komisiono fare de la prezidantino de la Konsilio de Hungaraj Virinoj. Belka Beleva kaj Maria Angelova donacis al la dommastrino la novan numeron de revuo „Bulgarino“ en Esperanto.



Gekongresanoj el Vraco, Bulgario

INFANA KONGRESETO


Ankaŭ niaj infanoj vigle aktivadis dum la kongresaj tagoj. Loĝigite en infandomo kun ĉiuj porinfanaj amuzajoj, 42 infanoj el 12 landoj amike interrilatis kaj amuziĝis, prezentis interesajn belartajn programojn. Kaj kio estas plej grava — ili parolis nur en Esperanto! . . . Inter ili estis ankaŭ niaj bulgaraj „verdaj steletoj“: Ivelina Angelova, Hristo Kanev, Evelina Mineva, Maria Hristova, Gjulthen Kerimova, Rusko Abaĝiev, Iskra Oljanova. Sub la zorgoj de Kalinka Vasileva ili bonege sin prezentis per sia propra salutprogramo kiel antaŭ la infana publiko, tiel ankaŭ antaŭ la kongresanoj-plenaĝuloj. Krome, estis ekskursoj, gajaj ludoj, teatraĵetoj. . . La etaj kongresanoj rapide amikiĝis kaj interkonsentis subteni pluajn kontaktojn kaj batali por sia feliĉa estonto.

Menciinda estas la partopreno de niaj samlandanoj en la jarkunvenoj kaj konferencoj de kooperativanoj, de medicinistoj, fervojistoj, en ekskursoj al vidindaĵoj en diversaj partoj de la lando. Emociplena estis la vizito en la Parlamentejo, kie spertaj ĉiĉerono kaj E-interpretisto detale informis la vizitantojn pri la historio de tiu belega konstruaĵo — simbolo de la hungara ŝtato. En la Parlamentejo mem okazis akcepto de István Sarlós — vicprezidanto de la Ministro-Prezidio de la Hungara Popola Respubliko, por reprezentantoj de la landaj E-asocioj, kiun ĉeestis ankaŭ reprezentantoj de BEA.

„. . . LA BULGAROJ ESTIS INTER LA PLEJ BONAJ EN LA ARTAJ PROGRAMOJ! . . .“

Per tiuj vortoj la respondeculino pri artaj kongresaj aranĝoj Eva Farkas-Tatár tostis kaj gratulis la aktoran paron Belka Beleva kaj Anani Anev dum la koktelo omaĝe al ilia bonega, emociplena ludo en la teatraĵo „Malnovmoda komedio“ de A. Arbuzov en la Kulturcentro „Pataki István“, okazinta la 4-an de aŭgusto. Sub la lerta reĝisorado de Nikola Petkov — ĉefreĝisoro de la Stata Muzika Teatro en Sofio, kaj de ilia kunlaborantino Angelina Sotirova, estis realigita spektaklo, per kiu Belka Beleva kaj Anani Anev ravis la publikon kaj provokis ŝtormajn aplaŭdojn. Kunfondintoj de la Bulgara Esperanto-Teatro, dum 25 jaroj ili sukcese partoprenis en multnombraj spektakloj sur Esperanta scenejo en dudeko da eŭropaj landoj. Ilia sinprezento en Budapeŝto estis krono de ilia 25-jara jubileo kaj ili plenerite ricevis la superlativan pritakson de la publiko.

Impona estis ankaŭ la spektaklo de la Bulgara Esperanto-Teatro kun arta gvidanto Kiril Draĵev. La aktora skipo denove pruvis siajn altajn artkvalitojn kaj bonegan uzon



La unua premio de la Internacia film-konkurso de ILEF aljuĝita al Kaoru Asaoka, Japanio.

de Esperanto dum la prezentado de „Epifanio“ de W. Shakespeare (la 2-an de aŭgusto). La ĉefajn rolojn ludis eminentaj bulgaraj geaktoroj: Nikola Anastasov, Javor Miluŝev, Georgi Kiŝkilov, Petár Vuĉkov, Sofia Karakaŝeva, Rumjana Gajtangiĉeva k.a. Dum la lastaj 25 jaroj BET riĉiĝis la Esperantan kulturon per multaj altnivelaj spektakloj, kiel ekzemple „Ĉasantoj de oficoj“, „Komedio de eraroj“, „Lernejo por virinoj“, „Mandragero“ k.a. La spektaklojn en teatro „Pataki“ ĉeestis prof. Tonkin kaj d-ro Renato Corsetti, kiuj alte taksis la plenumon de la geaktoroj.

En la Internacia Ĥora Koncerto bonege sin prezentis la Sofia Esperanto-Ĥoro kun fiorestro Dimitár Terziev, jam bone konata de aliaj partoprenoj en internaciaj E-forumoj. La bulgaraj ĥoristoj serioze konkuris la plenumojn de la hungara, pola kaj infana ĥoroj. Vera pinto en la Internacia Arta Vespero estis la partopreno de la bulgaraj kantartistoj Veselin Damjanov, Maria Angelova, Rene Jordanova kaj Angelina Mitova. Bone konataj al la internacia E-publiko dank’ al siaj koncertoj en diversaj landoj, ili denove kaj plenerite gajnis la aplaŭdojn de miloj da kongresanoj.

RESUMOJ KUN KONTENTECO

La 68-a UK en Budapeŝto fakte estis la plej amasa en la historio de la Esperanto-movado — pli ol 5000 aliĝintaj kongresanoj, ne kalkulante la gastojn kaj observantojn! Ĉu tio ne estas konvinka fakto, ke Esperanto per siaj noblaj celoj, per sia homamo kaj pacamo gajnas ĉiam pli da adeptoj en la tuta mondo? Plej eminentaj ŝtatestroj, deputitoj, sociagantoj rekonas la utilan kaj fervoran aktivadon de la esperantistoj en la nomo de plej gravaj kaj noblaj taskoj: interkompreniĝo kaj kunlaboro inter la popoloj pere de internacia lingvo, konservado de la naturo kaj de la monda paco — por la progreso de la homaro.

La bulgaraj geesperantistoj — partoprenantoj en tiu ĉi kongreso, inde prezentis sin kaj sian patrolandon kiel veraj patriotoj-internaciistoj, kiel aktivuloj de la monda Esperantomovado en diversaj fakaj organizaĵoj, sed antaŭ ĉio — kiel ardaĵ pacdefendantoj per siaj agoj kaj eldiroj en multnombraj kunvenoj kaj kunsidoj.

Ni revenis de Budapeŝto pliriĝigitaj per novaj akiraĵoj kaj sukcesoj, per novaj konatiĝoj kaj amikoj, al kiuj ni objektivite rakontis pri nia socialisma patrolando, pri niaj vivo kaj revoj, kiujn ni transformas en realon.

Budapeŝto-Sofio,
julio — aŭgusto 1983

DONCO ĤITROV



39a Internacia Junulara Kongreso de TEJO

Ĉu vi bone konas la agadon de TEJO? Ĉu vi estis iam en junulara medio? Al similaj demandoj trafe povas respondi nur tiuj, kiuj jam partoprenis la 39-an TEJO-kongreson en la pitoreska hungara urbo Debrecen. De la 23-a ĝis la 30-a de julio ĉi-jare 672 gejunuloj-delegitoj el 35 landoj de la mondo renkontiĝis dum la junulara Esperanto-forumo por esprimi sian firman volon vivi kaj agi en mondo sen atoma apokalipso, interrilati amike kaj fruktodone kunlabori.

Dum la kongreso en Debrecen renkontiĝis malnovaj konatuloj, efektiviĝis novaj amikiĝoj, ĉar Esperanto mirinde kunigas la gejunulojn, neniigante la lingvajn barojn, alproksimigante la junajn homojn kun malsamaj politikaj konceptoj kaj religia aparteno. En senperaj kontaktoj ili pli bone ekscias pri la vivo, kulturo kaj scienco de aliaj popoloj, emas pli bone ilin kompreni. La Internacia Lingvo unuigas ilin en grandan amikan rondon.

La ĉefa kongresa temo — „Informfluo en la nuntempa mondo“, ekinteresis ĉiujn kongresanojn kaj la diskutoj estis viglaj. Ĝi starigis gravajn kaj akrajn problemojn de la homa interkompreniĝo kaj kontaktiĝo pere de modernaj rimedoj de komunikado. Grandan intereseon vekis ankaŭ la aldonaj prelegoj lige kun la ĉefa temo: „La alia modelo de la gazetara strukturo“ (Sándor Révész), „Komunikado kaj

komputado“ (D-ro Péter Broczkò), „Pri Nova Internacia Informada Ordo“ (Ivica Špoljarec) ka. La prelegantoj samkiel la partoprenantoj en la diskutoj tuŝis la problemon pri multlingveco, kiu malhelpas la senperajn kontaktojn inter la popoloj kaj substrekis la rolon de Esperanto kiel bonega lingva interligilo, dank' al kiu realiĝas interŝanĝo de informoj en monda skalo. La demonstracioj per komputadtekniko estis brila pruvo pri la kreskanta rolo de la tekniko en interkomunikado.

Dank'al la riĉa kaj bunta kongresa programo, preparita de LKK sub la alta protektado de Jenő Kovács — prezidanto de la Nacia Konsilio de Hungara Junularo, la junaj kongresanoj bonege pasigis la kongresajn tagojn. Prezento de junularaj movadoj en diversaj landoj, ellerno de novaj esperantaj kantoj, amasa partopreno en la demonstraĵa kurado en la centro de Debrecen, la Hungara Nacia Vespero, vizitoj de junularaj kluboj, la Internacia Vespero, la interesaj ekskursoj al la ebenaĵo Hortóbagy kaj al la lago Vekeri, la nokta bano kaj la senĉesaj dancoj en diskotekoj — ĉiuj ĉi aranĝoj kolorigis la programerojn per neforgesebla amika etoso kaj amikiĝo de gejunuloj el grandaj kaj malgrandaj landoj, unuigitaj de ununura lingvo — Esperanto. Malfacile estas priskribi la junularan renkontiĝon en Debrecen, kiu forte entuziasmigis

ĉiujn partoprenantojn, samkiel la loĝantaron de la kongresa urbo. La TEJO-kongreso estis elokventa demonstracio de internaciismo, interkompreniĝo kaj amikeco kaj eĉ dum la kongresaj tagoj al la junulara forumo aliĝis multaj hungaroj — novaj adeptoj de la Esperanto-movado.

La ĉi-jara TEJO-kongreso okazis dudek jarojn post la 19-a TEJO kongreso en Vraca en 1963 kaj kvin jarojn post la 34-a TEJO-kongreso en Veliko Târnovo en 1978. Tiuokaze la prezidantino de la Bulgara Esperanto-Junularo Steliana Dimitrova kaj la sekretario de la Klubo de la Juna Artkrea Intelektularo

en Vraca Ljubomir Trifonĉovski vizitis la prezidanton de la Distrikta Popolkonsilantaro en Debrecen kaj la prezidanton de LKK d-ro Imre Szabó por saluti ilin kaj transdoni al ili la Honoran Insignon de urbo Vraca kaj memoraĵojn en la nomo de la bulgaraj gejunuloj-esperantistoj, kiuj kore dankas al la organizantoj de la TEJO-kongreso en Debrecen pro ilia gastamo kaj brila organizo de la monda esperantista junulara forumo.

La kongresaj tagoj jam pasis, sed ilin longe memoros ĉiuj, kiuj havis la feliĉon partopreni la kongreson en Debrecen.

L. TRIFONĈOVSKI

TEJO — HODIAŬ KAJ EN PERSPEKTIVO

Dum la TEJO-kongreso en Debrecen nia korespondantino **Roza Georgieva** el Veliko Târnovo starigis ses demandojn al d-ro Renato Corsetti — vicprezidanto de UEA kaj al la novelektita prezidanto de TEJO Ian Jackson, al kiuj ili estis afablaj respondi. Ĉi-sube ni donas lokon al iliaj respondoj.

— Ĉu la ĉi-jara TEJO-kongreso estas bone vizitita de gejunuloj?

D-ro Renato Corsetti: — Jes. Eĉ mi dirus, ke ĉi-jare aparte sentiĝas la manko de la kutimaj mezaĝuloj, kiuj obstine vizitas TEJO-kongresojn. Krome — la aĝo de la partoprenantoj estas meze tre malalta.

Ian Jackson: — Pritaksu vi mem: proksimume 650 partoprenantoj el 25 landoj, multaj el ili — el la socialismaj landoj. Proksimume 40 bulgaroj!

Tio estas duoblo de la nombro en la 38-a IJK en Belgio. La 39-a IJK estas unu el la plej grandaj kongresoj en la historio de TEJO.

— Kiuj estas, viaopinie, la plej gravaj kaj plej respondecaj taskoj de la esperantista junularo hodiaŭ?

D-ro Renato Corsetti: — Fortigi la komunumon de la junaj Esperanto-parolantoj kaj intensigi ties rilatojn. Tiamaniere la E-junularo samtempe laboros por Esperanto kaj por pli bonaj internaciaj rilatoj.

Ian Jackson: — Montri al la junularo de la mondo, ke ekzistas monda lingvoproblemo kaj ke uzo de Esperanto ege kontribuas al ĝia forigo. Montri al la pli aĝaj esperantistoj, ke la junaj E-parolantoj havas apartajn interesiĝojn kaj tradiciojn kaj ke la generacioj en la E-movado laŭeble kunlaboru, samtempe konservante siajn proprajn karakterizojn.

— Ĉu la monda esperantista junularo plimultiĝas?

D-ro Renato Corsetti: — Certe. Ĉefe estas in-

teresaj la lastaj evoluoj en ekstereŭropaj landoj.

Ian Jackson: — Jes, certe. En iuj landoj, ekzemple Japanio kaj Ĉinio, estas miloj da junaj E-parolantoj. En aliaj, ekzemple Peruo, pli-malpli la tuta E-movado konsistas el gejunuloj. En Eŭropo la populareco de oftaj renkontiĝoj kaj la daŭre evoluanta faka uzado de Esperanto inter studentoj montras, ke ankaŭ tie la junulara E-movado konstante kreskas.

— Kiamaniere TEJO agas por altiri novajn membrojn?

Renato Corsetti: — En la tradicia varbada maniero kaj aparte per multnombraj bonetosaj renkontiĝoj internaciaj de gejunuloj.

Ian Jackson: — Ni varbas per flugfolioj produktitaj de TEJO mem kaj kuraĝigas la landajn sekciojn de TEJO varbi en siaj landoj. Ĉiu membro de landa sekcio, por kiu la sekcio pagas malgrandan kotizon, estas ankaŭ asocia membro de TEJO. Eble plej grave — TEJO varbas per sia agado sur plej diversaj kampoj: fakaj seminarioj, labortendaroj kaj laborbrigadoj, Pasporta Servo kun ĝia unika reto de gastigantoj tra la mondo kaj, kompreneble, la Internaciaj Junularaj Kongresoj. Junulo aliĝos al TEJO nur se li vidas, ke TEJO ion interesan proponas al li. Ju pli varia kaj vasta estas nia agado, des pli da membroj ni povas atendi.

— Kiajn pli gravajn aranĝojn (enkadre de TEJO) oni povas atendi?

Renato Corsetti: — Venontjare okazos Internacia Junulara Kongreso en Britio. Krome okazos certe seminarioj pri aktualaj sociaj temoj kunlabore kun neesperantistaj organizaĵoj eble ankoraŭ en Strasburgo, eble aliloke.

Ian Jackson: — Ĉi-aŭtune — junulara semi-

nario laŭ subvencio, disponigita al TEJO de la Konsilio de Eŭropo. De la 13-a ĝis la 20-a de julio 1984 — en Swanwick, Britio, 40-IJK kun temo „Homo kaj Maŝino“. Daŭra plibonigo de la Pasporta Servo kaj aliaj servoj de TEJO. Kuraĝigo per kunlaboro kaj konsiloj al junularaj grupoj ekster Eŭropo, ke ili formu finfine novajn landajn sekciojn kaj forigu iom post iom la ĝisnunan eŭropecon de TEJO. Edukado de junaj gvidantoj por la E-movado.

— Kion vi volus bondeziri al la esperantista junularo kaj speciale al la junaj bulgaraj esperantistoj?

D-ro Renato Corsetti: — Ke ili baldaŭ enfluu la ĝeneralan movadon por doni al ĝi novajn ideojn kaj novan vigelecon.

La junaj bulgaraj esperantistoj devus, laŭ mia opinio, ankoraŭ pli energie agadi por konigi eksterlande siajn atingojn kaj por venigi al la mirinda Bulgario pli multajn junajn es-

perantistojn ĉefe el landoj kun malsamaj sociaj sistemoj — interŝanĝo de opinioj kaj de spertoj en tiaj kazoj estas, laŭ mi, la plej fruktodonaj.


Ian Jackson: — Al la esperantista junularo mi deziras, ke ĝi daŭre kresku kaj fortigosian voĉon en la monda junularo kaj ke ĝi provizu al la plenkreska movado konstantan fluon de novaj talentoj.

Al la bulgaraj junuloj, memorante IJK en Veliko Târnovo (granda sukceso) kaj la aliajn sukcesojn en la kunlaboro inter TEJO kaj la bulgara junularo, mi dezirus, ke ili klopodu ĉiam kontribui al la agado de TEJO, ĉar certe sen tia kontribuado de junulara movado tiel forta kiel la bulgara, TEJO ne povus tiel bone antaŭenigi Esperanton inter la junularo tutmonde.

Debrecen — Veliko
Târnovo, julio 1983

MONTODOMO „ESPERANTO“ — 20-JARA

Multajn jarojn la sofiaj esperantistoj revis havi sian propran montodomon sur Vitoŝamonto — por kolektiĝi, ripozadi kaj efektivi-gadi tie siajn esperantistajn iniciatojn. Ape-



naŭ en septembro 1959 estis farita la unua fosprovo.

La iniciato por konstruo apartenas al Sofia Turista Esperantista Sekcio „Esperanto“.

Kiel konstruloko oni elektis unu el la plej belaj kaj pitoreskaj lokoj de Vitoŝa — Ka-ranova poljana“. Ĝi situas meze de la norda flanko de la monto je alteco de 1425 m. De tie estas videbla preskaŭ tuta Sofio. La montodomo „Esperanto“ troviĝas je 3 km de la loko „Zlatnite mostove“ (La Oraj Pontoj) kaj je 20—25 minutoj da piedirado de la loko „Kopitoto“ (La nufu). Ambaŭ lokojn oni povus facile atingi per aŭtobuso el Sofio.

La montodomo estas projektita kaj provizita per konstrumaterialoj de la Direkcio de Fako „Lesoparkove“ ĉe Sofia Urba Popola Soveto. Kun granda entuziasmo kaj energio dekoj da esperantistoj-volontuloj dum ripoztagoj intense laboradis ĉe la konstruaĵo de la montodomo. Oni konstruis malsupran ejon kiel manĝosalonon kaj kuirejon por turistoj kaj supran ejon el dormoĉambroj kaj ĉambro por la dommastro. En la laboro partoprenis ankaŭ esperantistoj el la proksimaj loĝlokoj kaj eĉ multaj eksterlandaj esperantistoj, gastoj de Sofio. Por la konstruado estis necesa mono. Multaj bulgaraj kaj eksterlandaj esperantistoj manifestis sian malavarecon kaj volonte subvenciis la iniciaton.

Post ĉirkaŭ 4 jaroj de obstina konstrulaboro montodomo „Esperanto“ estis preta kaj en julio 1963, dum la 48-a Universala Kongreso de Esperanto en Sofio, estis oficiale malfermita. La solenaĵon partoprenis pli ol 600 kongresanoj el la tuta mondo.

Fratoj Ivan kaj Sotir Vasilev, vervaj esperantistoj el Pazarĝik, faris marmorplaton, sur kiu per ĉizitaj literoj estas skribite, ke la montodomon oni konstruis okaze de la 100-jariĝo de la aŭtoro de Esperanto L. L. Zamenhof.

Post la solena malfermo de montodomo „Esperanto“ tie okazis multaj diversspecaj E-aranĝoj, en kiuj partoprenis esperantistoj el Sofio kaj la najbaraj loĝlokoj. Lastatempe oni okazigas pli malofte E-iniciatojn en la montodomo. Estus dezirinde, ke oni estonte turnu pli da atento al montodomo „Esperanto“ kaj pli ofte organizu tie E-aranĝojn.

MINKO CONKOVSKI

INTERPAROLO KUN LERNANTINO DE LIDIA ZAMENHOF

Partoprenante la Unuan Internacian Metodikan Seminarion en Varsovio (aprilo 1983), nia redakciano **Marin Bâcev** havis multajn interesajn renkontigojn, interalie kun s-ino Maria Kosiaty el Nowy Sancerz, kiun li intervjuis.

— Kiam vi komencis lerni la Internacian Lingvon?
— Mi komencis lerni Esperanton antaŭ 52 jaroj, en 1931.

— Kiu estis via unua E-instruisto?

— Mia unua E-instruistino estis la filino de nia kara Majstro, Lidia Zamenhof.

— Kiom longe vi lernis Esperanton sub la gvido de Lidia Zamenhof?

— Sub ŝia gvido mi lernis tutan jaron kaj finis tri kursojn.

— Ĉu vi mem instruas Esperanton?

— Jes, mi dum pluraj jaroj instruas la Internacian Lingvon.

— Ĉu vi estas instruistino laŭprofesie?

— Ne, laŭprofesie mi ne estas instruistino, sed la E-instruado fariĝis por mi dua fako. . .

— Ĉu vi plu perfektigis viajn E-konojn post la lecionoj prenitaĵe de Lidia Zamenhof?

— Jes, kompreneble. Tion mi faris en 1961.

— Kiamaniere vi perfektigis viajn lingvokonojn?

— Mi partoprenis superan kurson de Esperanto en la kadro de la Internaciaj Porinstruistaj Kursoj en Bulgario, okazintaj en 1961 en la nigramara urbo Burgas.

— Ho, tre interese! Kaj kiu estis via instruisto?

— Mia instruanto estis s-ro Kunčo Válev, tre simpatia homo.

— Kiaj estas viaj impresoj pri Lidia Zamenhof?

— Mi povas diri, ke Lidia Zamenhof, la filino de nia Majstro, estis tre simila al sia patro.

— Ĉu vi povus rakonti ion pri strato „Zamenhof“ en Varsovio?

— Jes! Mi estas unu el la personoj, kiuj kolektis subskribojn sub la propono, ke la strato, kie iam loĝis Zamenhof, estu nomita je lia nomo.

— Kiam okazis tio? En kiu jaro?

— Tio okazis, kiam mi lernis Esperanton. Estis 1931, aŭ eble 1932.

— Kiel vi kolektis subskribojn kaj de kiaj personoj?

— Mi kun aliaj junaj kaj entuziasmaj lernantinoj-esperantistinoj iris de strato al strato, de domo al domo kaj petis subskribojn por nomigo de tiu strato, kaj la tiama registaro plenumis nian peton kaj nomis ĝin Zamenhofa strato.

— Ĉu tiu strato estis la lasta, kie loĝis Zamenhof?

— Jes, tiu strato estis la lasta, kie li loĝis ĝis sia morto.

— Kiel estis nomata la strato antaŭe?

— Antaŭe la strato estis nomata „Dika“, kio en pola lingvo signifas „sovaĝa“. Kial estis tiu nomo, mi ne scias. . . Sed mi volas atentigi, ke oni ne alinomis la tutan straton. Tiam la strato estis tre longa kaj oni nomis nur parton de ĝi je la nomo de Zamenhof.

— Kie troviĝas strato „Zamenhof“?

— Strato „Zamenhof“ estas paralela al la stratoj „Marchlewskiego“ kaj „M. Nowotki“ kaj inter la stratoj „Mariana Buczka“ kaj „Gen. K. Swierczewskiego“, proksime de Nowe kaj Stare Miasto kaj pli proksime al parko-gardeno Krasińskich, do en la nordokcidenta parto de la urba centro.

— Ĉu vi planas vojaĝi al Bulgario?

— Mi volas nepre viziti vian novan E-domon en Pisanica, pri kiu mi multe estas aŭdinta kaj leginta ke ĝi estas belega moderna konstruaĵo en la sino de Rodopi-montaro. . .

— Mi kore dankas al vi, s-ino Kosiaty, pro via afableco respondi al miaj demandoj, kaj mi volas kredigi vin, ke vi estas ĉiam bonvena en nia lando kaj en nia Esperantujo — Pisanica. Gis reveno en Bulgario!

NOVAJ AKADEMIANOJ

Laŭ lastatempa komuniko la Akademio de Esperanto havas kvin novajn membrojn. Ili estas PROBAL DAŠGUPTO (vicprofesoro pri sanskritidaj lingvoj en Puneo, Hinda Unio), BERNARD GOLDEN (arkeologo en Veszprem, Hungario), LI SHIJUN (tradukisto en Pekino, Ĉinio), BRUCE ARNE SHERWOOD (viddirektoro de esplorlaboratorio pri komputila instruado en Urbana, Usono) kaj HUMPHREY TONKIN (profesoro pri angla literaturo en Filadelfio, Usono). La komuniko informas ankaŭ pri la reelekto de 12 akademianoj, kies

membreco samkiel tiu de la kvin novaj daŭros pliajn naŭ jarojn (1983—1991).

Iam estis disvastigita la opinio, ke francoj „regas“ en la Akademio. Tio nun certe ne plu ĝustas, ĉar elentute 46 akademianoj nur 5 estas denaskaj parolantoj de la franca lingvo. Se iu tiusence regas la Akademion, tio estas la angla-lingvanoj, kies nombro estas 12, kaj tio proksimiĝas al kvarono de la tuta akademia membraro. Fakte, 23 akademianoj (do, precize duono) estas denaskaj parolantoj de la germanaj lingvoj (afrikansa — 1, angla — 12, dana — 1, germana — 3, islanda — 1, nederlanda — 2, norvega — 2 kaj sveda — 1), kompare kun 12 parolantoj de la romanidaj lingvoj, 6 — de la slavaj, 4 — de neeŭropaj lingvoj kaj 1 parolanto de finn-ugra lingvo. Ankaŭ geografie la Akademio estas tro eŭropa, ĉar nur 11 mem-

broj loĝas ekster Eŭropo (kvankam pluraj el ili estas elmigrintaj eŭropanoj). Tiurilate estas aparte bonvena la nuna elekto de la akademianoj Daŝgupto kaj Li Shijun, kies ĉeesto iom mildigas ĝian emfaze eŭropan konsiston.

La nomo „Akademio“ aperis en la Movado antaŭ 75 jaroj, en 1908, kiam akademio fakte estis iaspeca 12-membra labororgano de la Lingva Komitato, kiu kreigis en 1905 kaj nombris centon da membroj. La Lingva Komitato ekzistis ĝis la Dua Mondmilito. La nuna Akademio de Esperanto kreigis en 1948 kaj laŭ sia statuto, ĝi povas havi maksimume 50 membrojn. Tiu statuto (akceptita en 1964) difinas, ke la ĉefa tasko de la Akademio estas „konservi kaj protekti la fundamentajn principojn de la lingvo Esperanto kaj kontroli ĝian evoluon“.

(El „Budapeŝta Informilo“, 7/1983)

ŜI BRILAS PER SIA PROPRA LUMO...

Lige kun la 90-jariĝo de la eminenta bulgara poetino Elisaveta Bagrjana kaj ŝia distingo tiukaze per la plej alta ŝtata titolo „Heroo de Popola Respubliko Bulgario“.



La poezio de Elisaveta Bagrjana vekas multajn pensojn kaj demandojn. La plej interesa el ili eble estas: kie estas la pro-

funda fonto de ŝia krea inspiro, en kio konsistas ŝia neordinara poezia majstrecio?

La poezia verkaro de Bagrjana prezentas multflankan intereson: kaj kiel respegulo de unu homa sorto, kaj kiel vojo al la mondo, kaj kiel rimarkinda krea evoluo de poeto, ensorbinta ĉion plej valoran el la mirinda arto de la bulgara folkloro kaj el la tradicioj de la bulgara nacia poezio.

Bagrjana aparte distingiĝas per sia vivopovo de kreanto. Ŝiaj unuaj versaĵoj aperas en 1915. En la komenco de la dudekaj jaroj ŝi aktive eniras la bulgaran literaturan vivon. Kaj en daŭro de pli ol ses jardekoj ŝi konstante ĉeestas en la bulgara literaturo. Malfacile estas trapasi tian longan vojon de kreanto — por tio estas necesa efektive neelĉerpebla talento.

Tre postulema al si mem, Bagrjana publikigas relative malmultajn verkojn dum tiu tre longa periodo. Sed, ĉiam fidela al si mem, neniam perfidanta al sia kreindividueco, ŝi ne maljuniĝas kiel poetino. Kiu estas la sekreto de ŝia krea longvivado? Eble antaŭ ĉio la fakto, ke ŝiaj kreoserĉadoj ĉiam estas direktitaj al ŝiaj propraj travivaĵoj, sentoj, impresoj. . . ŝi ne serĉas nutraĵon por sia poezia imagopovo en eksteraj — literaturaj aŭ aliaj alblovoj.

Kiam oni demandis ŝin: „Kio plej multe mirigas vin en la vivo?“ — ŝi respondis: „La vivo mem. Kiom pli longe mi vivas, tiom pli mi miras pri la vivo.“

Kiel poetino Bagrjana malkovras sian rila-

ton al la vivo en ĉiu sia verko, per siaj poeziaj bildoj kaj meditoj. La naciaj trajtoj en ŝia verkaro manifestiĝas en kelkaj sferoj — en la temaro kaj bildeco, en la profunda ligo kun la poezia mondo de la bulgara folkloro, en la riĉeco kaj esprimpovo de ŝia poezia lingvo, en la kuraĝa kaj aŭdaca malkovro de l'animo de la bulgara virino en ties historia evoluo kaj en la bulgara nacia sorto ĝenerale.

Kaj io alia: Bagrjana aldonis en la bulgaran poezion abnegacian kaj mildan, ribeleman kaj

antaŭendirektitan virinecon kaj profundan, emocian sincerecon. Si atingis en sia poezia mondo harmonion kaj internan koncentriĝon — signo de granda talento, de granda spirito kaj de granda arto.

Estas poetoj, kiuj, simile al la luno, respiegulas fremdan lumon. Sed Bagrjana jam pli ol kvindek jarojn brilas per sia propra lumo sur la pulgara poezia firmamento.

Akad. PETĀR DINEKOV

ELISAVETA BAGRJANA

IDINO

Mankas bildoj de la pragepatroj,
mankas familia branĉo de l'gent' —
mi ne scias pri iliaj kantoj,
nek enhavo de la testament'.

Sed mi sentas: pulsas la antikva,
vaga, de nomada gento sang'.
Nokte puŝas min al la deklivo
kruta, kaj ĝi estas peka am'.

Eble praavino nigrokula,
en sakpantalono kaj turban'.
kaŝforkuris nokte kun fremdulo
el alia gento — ĉarma ĥan'.

Eble fulmrapidis la ĉevalo
tra la ebenaĵoj de Danub',
ambaŭ ilin savis de la glavono
vento, kiu hufojn kaŝis nur!

Tial mi rilatas kun admiro
al kamparo vasta kaj sen fin',
al senzorgaj kantoj de la birdoj,
al ĉevalkurado sub la vip'.

Eble estas peka kaj perfida,
eble mi pereos kiel bard' —
sed mi ĉiam estos via ido,
mia kara admirinda land'.

Tradukis: ĤRIMA

NI RECENZAS

Ukrainaj popolaj fabeloj en Esperanto

Ukrainaj popolaj fabeloj. Kompilis kaj tradukis el la ukraina Nadija Ĥordijenko-Andrianova. Redaktis Lidia Raeva. Eldonis ofsete Bulgara Esperantista Asocio, Sofio, 1983. 80 paĝoj.

La konatiĝo kun la popolaj fabeloj de iu ajn popolo estas ĉiam festo de la animo kaj ne nur por infanoj, sed ankaŭ por plenkreskuloj, ĉar ne eblas trovi homon, kiu neniam migris tra la belega fabellando. Bedaŭrinde, tiaj festoj por la E-legantaro ne estas oftaj. Tial ni devas danki al la konata ukraina verkistino, poetino kaj tradukistino Nadija Ĥordijenko-Andrianova pro la kompilo kaj traduko en Esperanton de kolekto da elektitaj ukrainaj popolfabeloj.

La kolekto entenas 21 fabelojn kaj eseon pri la ukrainaj popolaj fabeloj kaj pri la folkoro ĝenerale, verkitan de la kompilantino anstataŭ postparolo.

La fabeloj, prezentantaj nur malgrandan parton de la ukraina fabela folkloro, ampleksas ĉiujn grupojn de fabeloj: prianimalaj, sorĉaj-aventuraj, heroaj kaj sociaj-primoraj.

La fabeloj en la kolekto respiegulas la riĉan vivosperton de la ukraina popolo, same kiel tipajn ecojn de ĝia karaktero — aŭdacon, laboremon, honestecon, liberamon, senton pri etiko kaj estetiko. Ili tuŝas multajn moralajn problemojn kaj prezentas bildon de morale sana kaj optimisma popolo — popolo laborulo kaj kreanto.

En la eseo la aŭtorino analizas la ukrainajn

popolajn fabelojn kaj montras la grandan rolon de la popolaj fabeloj, kantoj kaj legendoj en la vivo de la ukraina popolo. Lige kun la sorĉaj fabeloj, bazante sin sur iuj konataj faktoj, ŝi tuŝas la interesan problemon pri ilia reala bazo — la probabla vizito al nia planedo de niaj gefratoj el aliaj planedoj kaj galaksioj — reprezentantoj de multe pli evoluintaj civilizacioj. Konklude ŝi informas la legantojn pri siaj planoj aperigi pliajn volumetojn de ukraina popola eposo en Esperanta traduko.

La libro estas belaspekta kaj trafe ornamita per ukrainaj vinjetoj. Bedaŭrinde, la preseroj (pro kulpo de la presejo) ne estas malmultaj, kaj iuj el ili eĉ malhelpas la komprenon de la frazo.

Pri la traduko mi povas diri, ke ĝenerale ĝi estas bonstila kaj trafa, sed mi ne povas ne montri iujn malperfektaĵojn kun la bona intenco helpi la tradukistinon en ŝia plua laboro tiudirekte. Antaŭ ĉio, en la traduko estas sentebla certagrada influo de la originalo, precipe

en la vortordo. Estas populara la koncepto, ke la Esperanta vortordo estas libera, tamen ankaŭ por ĝi validas certaj principoj, kiuj konformas al la natura iro de la penso. La normalan vortordon oni povas kaj devas ŝanĝi, se necesas akcenti iun frazelementon. Eble per konservo de la vortordo de l'originalo la tradukistino volis interpreti la karakteran stilon de la ukrainaj popolaj fabeloj. Tamen tiu ĉi vortordo en Esperanto ŝokas la alinaciajn legantojn. Alia manifestiĝo de la influo de ukraina lingvo estas la ne-uzo de la artikolo tie, kie ĝi estas absolute necesa (ekz.: Ivano Forta Mano anst. Ivano la Forta Mano). Mi montras ankaŭ iujn erarajn uzojn de vortoj: *volas anst. postulas aŭ bezonas* (p. 7), *mezaĝa frato anst. la meza laŭ aĝo frato* (p. 48), *surbrustajo anst. sino* (p. 44).

Malgraŭ la montraj malperfektaĵoj, la **Ukrainaj popolaj fabeloj** estas ne nur leginda libro, sed ankaŭ taŭga helpilo ĉe la instruado de Esperanto.

DIMITAR HAĜIEV

STEFKA PROHASKOVA NE PLU ESTAS INTER NI...

(21. I. 1924—31. VII. 1983)

La nomo de la popola aktorino Stefka Prohaskova estas ligita kun la kreo kaj evoluo de la bulgara socialisma teatro, al kiu ŝi dediĉis sian amon kaj sindonemon de kreado.

Sia alta teatrokulturo, profesia etiko kaj homa nobleco vicigis ŝin inter la eminentaj kreadoj de la bulgara nuntempa teatro.

Ŝi estis aktoro-reĝisoro en la Nacia Teatro „Ivan Vazov“, instruistino en la Supera Instituto de Teatroarto. Dum pluraj jaroj ŝi laboris en teatro „Trudov Front“, kie sukcese en-

scenigis vicon da teatraĵoj de bulgaraj aŭtoroj kaj de la monda klasika dramaturgio.

Depost 1978 Stefka Prohaskova estis ĉefreĝisoro de „Teatro 199“, kaj sur tiu posteno ŝin trafis la morto.

Por ni tamen ŝi estas nia reĝisoro, nia kolego, nia amikino — simple Stefka. Fama pro sia senlaca krea laboro, ŝi trovis fortojn por realigo de teatraĵoj en Esperanto.

Sur la arkiva foto de nia unua spektaklo en majo 1958 sur la scenejo de la tiama dram-



La reĝisorino Stefka Prohaskova dum provludo kun la geaktoroj Veselin Damjanov, Belka Beleva (maldekstre) kaj Anani Anev (dekstre)

teatro „Trudov Front“ en Sofio, ĉirkaŭite de siaj geaktoroj, ridetas juna, svelta virino, aplaŭdata de la publiko. Ĉar ĝuste ŝi estis la unua reĝisoro de profesia esperantlingva teatra trupo, kiun ni nomis Bulgara Esperanto-Teatro (BET).

Por la jubilea UK en Varsovio en 1959 Stefka Prohaskova enscenigis la komedion de Ivan Vazov „Casantoj de oficoj“. La interesa, moderna stilo de ŝia spektaklo ravis la gekongresanojn kaj la bulgaran E-publikon en diversaj urboj de la lando.

Nova krea pinto en ŝia laboro estis la dediĉita al la 34-a Nacia Esperanto-Kongreso en Veliko Târnovo kaj al la 48-a UK en 1963 en Sofio enscenigo de „Komedio de eraĵoj“ de Sekspiro. Per riĉa fantazio, sento pri

stilo, ŝprucanta humuro, lingva kulturo ŝi gvidis nin sur la scenejo, por prezenti spektaklon, kiu estiĝis klasika en la historio de BET.

Nia lasta krea renkontiĝo kun Stefka Prohaskova en BET estis en 1979, dum preparo de la teatraĵo „Amo“ de Paul Jeraldi por la UK en Lucerno. Kian riĉan sperton ŝi jam posedis, kian saĝan penson por eltrovi la profundan sencan de ĉiu frazo, de ĉiu situacio, por atingi pintojn de tragedieco! Ŝi jam serioze malsanis, tamen ambicion, flamon ŝi ne perdis. Tia ŝi aspektas sur la lasta foto kun ni — proponante ion novan, ion interesan.

Ŝi havis plenan rajton enscenigi nian 25-jaran jubilean spektaklon, tamen treege peza malsano jam forprenis ŝiajn fortojn.

BELKA BELEVA

FORPISIS NIA KARMEMORA RAJNA...



kaj sentis sin senfine feliĉa. . Sed baldaŭ poste ŝin trovis la morto — tiu rigora morto, kiu venas ofte neatendite por disigi nin de koraj kaj plej amataj amikoj. . . Tiel okazis kun nia ŝatata, kara Rajna Konstantinova.

Naskita en Ŝumen en 1920, estante jam gimnazia lernantino, ŝi komencis fervore lerni Esperanton kaj ekamis ĝin por ĉiam. Poste, kiel studentino en la Sofia Universitato pri germana kaj slava filologioj, ŝi firmigis ankaŭ ŝiajn konojn pri Esperanto, kiu baldaŭ estiĝis ŝia alloga kaj fruktodona okupo.

Sentante verkemon, Rajna Konstantinova sin dediĉis al verkado kaj estiĝis bona verkistino. Ŝi membriĝis en la Literatura Rondo ĉe BEA kaj tie ŝi elmontris sian talenton de bona rakontistino, posedanta perfekte la Internacian Lingvon. Ŝiaj verkoj „La virinoj en la familio de Zamenhof“, „Promeno en la infaneco“, „Jaluzo“, „Sep blankaj narcisoj“ kaj multaj aliaj restos kiel modelaj verkoj en la E-literaturo. Ofte ŝiaj verkoj gajnis premiojn en diversaj literaturaj E-konkursoj — enlandaj kaj eksterlandaj.

Okaze de ŝia 60-jara jubileo Rajna Konstantinova estis celebrita en sofia E-societo „Maksim Gorkij“ pro ŝia longdaŭra E-verkado. La lastajn jarojn de sia vivo ŝi estis ankaŭ korektistino de „Paco“ — organo de MEM, eldonata en Bulgario.

Ni ĉiuj rememoros pri nia neforgesebla amikino Rajna Konstantinova kiel pri homo ĉiam okupata pri kaj por Esperanto, ĉiam preta helpi lingve, ĉiam gaja kaj ridetanta.

LJUBA BOJAĜIEVA

Kia malbona fato! Kia malfeliĉa sorto. Post la juli-aŭgustaj amikplenaj, intimigantaj kongrestagoj venis neatendita, nekredibla kaj samtempe ege malĝojiga sciigo — nia Rajna Konstantinova — René — ne estas plu inter ni. . .

Ŝi iris al la 68-Universala Kongreso de Esperanto en Budapeŝto kun ĝojo kaj espero, ke tie ŝi renkontiĝos kun koraj kaj bonaj malnovaj kaj novaj amikoj, delonge amataj esperantistoj.

Tie efektive ŝi trovis ilin. Kun ili ŝi konversaciis amike, ridis gaje, elkore amuziĝis

SUKCESA KONFERENCO DE MEDICINISTOJ

En la slovaka urbo Poprad de la 25-a ĝis la 29-a de julio k. j. okazis la IV Internacia Medicina Esperanto-Konferenco (IMEK). Ĝin organizis la Medicina Sekcio de Asocio de Esperantistoj en Slovaka SR kunlabore kun Medicina Sekcio de Ĉeĥa E-Asocio, Subtatra E-Klubo ĉe Sindikata Klubo Vagonka en Poprad. Aktive subtenis la preparlaborojn ankaŭ Universala Medicina Esperanto-Asocio. La Konferenco partoprenis entute 80 medicinistoj el Ĉeĥoslovakio, GDR, Hungario, FRG, Pollando, Rumanio, Svedio kaj Bulgario.

Pli ol 30 prelegoj tuŝis la du ĉeftemojn „Apliko de Esperanto en medicino en la Monda Komunika Jaro 1983“ kaj „La problemoj de laborhigieno en la sanitarejoj“. El la partoprenantaj 12 bulgaraj medicinistoj prelegis:

1. Prof. d-ro. Popov pri „Higienaj laborpostuloj en la fako „patologia anatomio“.

2. Doc. K. Mečkov — „Psiko kaj medicino — agadkampo por ĉiu medicina laboristo“.

3. N. Abaĝieva — „Medicina asekurado de pasaĝeroj en la bulgara transporto en kaj ekster Bulgario“.

4. D-rino Maria Lukanova — „La sanitara edukado por formado kaj konfirmado de sankonforma vivmaniero“.

5. D-rino T. Omer kaj doc. C. Ignev — „Influo de la metilalkoholo sur la psikopatologion de alkoholuloj“.

6. D-rino Sl. Todorova — Nuntempa koncepto pri sindromo de Gianotti—Grosti“.

Fine de la Konferenco oni akceptis MALFERMITAN LETERON al ĉiuj medicinistoj, farmacistoj, veterinaroj, dentistoj, flegistinoj kaj aliaj sanlaboruloj.

La bona organizo kaj la agrabla restado en Poprad kontribuis al varmaj kaj amikaj kolegaj kontaktoj.

Prof. d-ro KIRIL POPOV

E-KURSOJ POR LINGVO-INSTRUISTOJ

De la 1-a ĝis la 16-a de julio k. j. en Bankja oni okazigis E-kursojn de dua kaj tria gradoj. Ili estis organizitaj de la Centra Instituto por Perfektiĝo de Instruistoj kaj Gvidorganoj kaj de la Instruista Sekcio ĉe BEA. En la kursoj partoprenis instruistoj de bulgara kaj fremdaj lingvoj. Malgraŭ la laciĝo pro la ĵus pasinta lernojar, malgraŭ la intensa kursoprogramo, la ĉiutagaj kvar horoj estis variigitaj per multaj agrablaj, neforgesablaj elementoj. La du spertaj instruantoj — Kunĉo Válev kaj Violin Oljanov, kun granda pedagogia majstreco kaj sagaco, kun erudicio kaj emocio gvidis la lernohorojn.

En bone elektata momento ili ŝanĝadis la gramatikajn ekzercojn per gaja, incitema kanto aŭ interesa rakonto pri la historio de Esperanto. La aktualeco de la althumana senmorta ideo de la kreinto de la Internacia Lingvo d-ro L. L. Zamenhof allogis nin, kaj tiu sento estis manifestata en la rilatoj inter la gekursanoj. Ni interrilatis amike kaj helpis unu al la alia, estis sentata pli alta morala kaj etika konduto kaj nobligo ĉe ĉiuj.

Alia nekontestebla merito de la kursoj estas, ke ili ludis rolon por la metodika kaj pedagogia refreŝiĝo kaj estis bonega okazo elprovi sur nin mem kaj rekonsciigi niajn metodikan lertecon kaj metodojn.

En la nomo de la partoprenantoj en la E-kursoj en Bankja mi esprimas koran dankon pro la disponigita ebleco altigi nian profesion kvalifikon de lingvaj instruistoj kaj lerni la mirindan Internacian Lingvon Esperanto.

VERA NAJDENOVA

La 17-an de majo 1983 estis malfermita la unua postdiploma kurso por esperantistoj, kiu koncernas problemojn de la produktad-ekologiigo. La kurson iniciatis Bulgara Esperantista Asocio, Supera Ekonomia Instituto „D. A. Cenov“ — Svištov kaj la estraro de postdiplomaj kursoj pri ekologio (ĉi-lastata reprezentita de prof. Hristo Marinov).

La instruado daŭros unu jaron. La kurso estas koresponda kaj finiĝos per defendo de disertaĵoj. La finstudintoj ricevos specialan diplomon de supera kvalifiko pri ekologiaj problemoj. La unuaj kursanoj estas el: Aŭstrio, Hungario, Pollando, Sovet-Unio kaj Bulgario.

Al la ekologia kurso povas aliĝi ankaŭ esperantistoj el aliaj landoj, kiuj havas sciencajn interesojn pri la nuntempa ekologio. La adreso estas: Slediplomno otdelenie (prof. Hristo Marinov), VFISI „D. A. Cenov“, BG-5250 SVIŠTOV, Bulgario.

La defendo de la disertaĵoj okazos en majo 1984 enkadre de la Internacia Konferenco „Svieko'84“, en kiu okazos speciala Esperanta simpozio.

Ĉiuj esperantistoj, kiuj estas aŭtoroj de artikoloj kaj libroj pri ekologio estas petataj sendi ilin laŭ la indikita adreso.

PEPA BOJANOVA

NOVAJ AMIKOJ DE NIA LINGVO

La E-klubo „Metalurgo“ ĉe la Kulturdomo de Kombinumo por aluminiadoj „St. Stamenov“ — Ŝumen, jam duan jaron organizas Esperantan kurson por komencantoj. En unu el la klasĉambroj de la Profesia Studentaro ĉiun jaŭdon kolektiĝis la partoprenantoj. Ili estis el diversaj fakoj kaj oficejoj, precipe junaj homoj entuziasmitaj de la nobla ideo pri amikaj ligoj kun fremdaj landoj kaj popoloj. Diligente kaj obstine ili lernis sub la gvido de la multjara esperantisto kaj kursgvidanto Ilija Andreev.

Kun bonaj rezultoj la E-kurson finis Ivan Aleksandrov — elektroteknikisto, Spas Aleksandrov — muntisto, Todorka Ilieva k.a Ĉiuj esprimis grandan dankon al la kombinuma sindikata estraro, dank' al kies helpo parto de ili havis eblecon ripozi kaj perfektigi siajn lingvokononjn en la E-domo en v. Pisanica.

CVJATKO TODOROV



Sukcese finintaj E-kursojn por instruistoj en Bankja kun lektoroj Kunĉo Válev kaj Violin Oljanov. Foto: Lasto Nikov.

ESPERANTISTOJ EL RUSE EN POTSDAM

Ĉi-jare en la ĝemela de Ruse urbo Potsdam (GDR) oni organizis internacian simpozion, dediĉitan al la jubileo de Karl Marks. Partoprenis delegitaroj el ĝemelaj urboj, oficialaj reprezentantoj de Potsdam kaj ties ĉirkaŭaĵo, esperantistoj kaj reprezentantoj de aliaj distriktoj de GDR. La ruseajn esperantistojn reprezentis Georgi Dobrev kaj Nedko Nedev, prezidanto kaj vicprezidanto de la Distrikta Estraro de BEA.

Oni faris vicon da referaĵoj, informoj kaj sciencaj komunikaĵoj pri la personeco kaj senmorta faro de Karl Marks. Kun aparta intereso oni renkontis la materialon de Georgi Dobrev pri enpenetro de la ideoj de Karl Marks, de la scienca socialismo en Bulgario.

La simpozio pasis sub la signo de maltrankvilo pro la agresema kaj militama politiko de la usona imperiismo kaj la NATO-generaloj, minacantaj la homaron per neniiga termonuklea milito. Tial la arango pasis sub la devizo: „Gardi la pacon, signifas konservi la vivon sur nia planedo. Tio estas la devizo de nia epoko!“

JORDAN KALINOV

VALORA DONACO

La distrikta Artgalerio en Pazarĝik akiris dudek skulptaĵojn de la skulptisto Anastas Dudulov, profesoro en la Arta Akademio en Sofio. La artaĵoj estas parto de la „Jubilea ekspozicio“ de Dudulov okaze de lia 90-jariĝo en 1983 kaj havas valoron de pli ol 20 000 levoj.

La donacon faris la esperantistino d-ro R. Dudulova, fratino de la forpasinta en 1971 prof. Anastas Dudulov, kiu pasigis siajn lernojarojn en Pazarĝik.

„BE“

VARIA EKSURSO

La junaj esperantistoj el urbo Ĉepelare ekskursis en junio al Balkan-montaro — atestanto de gloraj bataĵoj por justeco kaj libero de la bulgara popolo. La ekskurso estis organizita de la estraro de E-societo „Diĉo Petrov“ — Ĉepelare kiel premio pro aktiva kultur-amasa laboro kaj sukcesa partopreno en naciaj artrevojoj kaj internaciaj festivaloj. Oni vizitis la urbojn Karlovo, Kalofer, Kazanlâk, Ŝipka kaj montopintoj Stoletoŭ kaj Buzluĝa.

En Karlovo oni vizitis la domon-muzeon de Vasil Levski kaj la akvofalon, en Kalofer — la domon-muzeon de Ĥristo Botev, en Ŝipka — la templon-monumenton de la rusaj soldatoj pereintaj en la bataĵoj Ŝipka-Ŝejnovo. Ĉe montopinto Stoletoŭ la partoprenantoj en la ekskurso kliniĝis antaŭ la monumento-maŭzoleo de la herooj de Ŝipka kaj en Buzluĝa kun intereso oni trarigardis la memorejon, konstruitan omaĝe al la glora vojo de la Partio ekde 1891 niaj tagoj.

La itinero daŭris poste tra Stara Zagora kaj Ĉirpan. La junaj ekskursantoj restis tre kontentaj kaj spirite riĉigitaj de multaj kaj neforgeseblaj travivaĵoj. Survoje ili ricevis pri ĉiu vizitata urbo, turisma vidindaĵo aŭ historia loko detalajn geografiajn, ekonomiajn kaj politikajn informojn.

ZAPRJAN ZAPRJANOV



Sukcese finiĝinta E-kurso en Trjavna, kiun partoprenis medicinistoj el la urba hospitalo. Sur la foto: la kursanoj kun sia gvidanto Ivan Gamzov — disdono de la atestiloj.

INTERNACIA RENKONTIĜO DE KOLEKTANTOJ

Ĉi-jare en urbo Valtice, Slovakio, okazis la laŭvica Internacia Renkontiĝo de Esperantistoj-Kolektantoj. Ĝia ĉefa organizanto estas la konata slovakaj esperantistoj kaj elstara kolektanto Vlada Hasala.

La ĉi-jaran renkontiĝon partoprenis kolektantoj el Ĉeĥoslovakio, Pollando, Aŭstrio, Nederlando, USSR, Bulgario. Speciale venis ĉeĥoslovakaj esperantistoj-radioamatoroj, kiuj rakontis pri siaj ligoj kun radioamatoroj el la tuta mondo.

La ideo pri fondo de internacia esperantista sekcio de kolektantoj estas delonge lanĉata kaj jam maturiĝis. Dum tiu renkontiĝo oni devis pridiskuti ĝin. En sia raporto la redaktoro de revuo „Kolektanto“ rakontis pri la agado de la bulgaraj esperantistoj-kolektantoj. Li informis, ke multaj esperantistoj skribis al la redakcio, pledante pri fondo de tia sekcio, konigis al la ĉeestantoj la enhavon de kelkaj artikoloj lige kun la problemo, publikigitaj en „Kolektanto“, parolis pri la signifo de tia sekcio kaj pri la rolo, kiun ĝi povus ludi en la vivo de la tutmonda esperantistaro, ĉar, kiel konate, preskaŭ ĉiuj esperantistoj kolektas ion.

Favoran opinionon esprimis la reprezentantoj de Ĉeĥoslovakio, Pollando, USSR kaj aliaj.

Estis decidite, ke la redakcio de „Kolektanto“ sendu specialajn leterojn al la naciaj E-asocioj kaj al UEA por informi ilin pri la laboro de la kunveno en Valtice pri la esprimita favora rilato al la ideo pri fondo de internacia sekcio de esperantistoj-kolektantoj. Kaj la gvidantoj de la sekcioj de kolektantoj el Bulgario kaj Ĉeĥoslovakio sin devigis ĝeneraligi la rezultojn de la ricevotaj leteroj-respondoj kaj poste proponi la fondon de internacia sekcio de la kolektantoj. Ili preparos ankaŭ ĉiujn necesajn materialojn kaj dokumentojn.

La internacia sekcio de kolektantoj sendube povus fari grandan laboron, utilan ne nur por apartaj esperantistoj, sed ankaŭ por propagando de Esperanto ĝenerale. Pro tio la ideo pri ĝia fondo devas esti vaste kaj serioze subtenata.

La propono pri organizo de ĉiujaraj renkontiĝoj de kolektantoj en diversaj landoj (ne nur en Ĉeĥoslovakio) ankaŭ meritas atenton.

DIMITĀR DENĈEV,
redaktoro de „Kolektanto“

VERDAJ STELETOJ



MAYNE REID

(1818—1883)

En la herboriĉa savano per malrapida, trankvila paŝo ĉevalo portas sian strangan rajdanton, similan al malbonsigna fantomo: la rajdanto ne havas kapon. . . Terura danĝero — linĉado, minacas la heroon, kaj nur en la lasta momento, kiam oni jam ligis la ŝnuron al la branĉo, venas la neatendita savo. . . En la malproksima Himalaĵo bravaj „ĉasantoj de plantoj“ submetas sin al mortdanĝero, kolektante specimenojn de la Himalaja flaŭro por botanika plantejo.



Kiu estas la aŭtoro de tiuj strangaj aventuroj, transportantaj la leganton en plej malproksimajn lokojn de nia planedo? Ĉu vi jam divenis, kara juna leganto?

Thomas Mayne Reid naskiĝis en Irlando la 4-an de aprilo 1818. Irlando de tiu tempo estis lando de teruraj mizero, malsato, nacia kaj religia subpremado. De tie la estonta verkisto elportis kaj konservis dum sia tuta vivo malamon al ĉiuj specoj de subpremado kaj despotismo.

La kariero de ekleziulo, por kiu lin destinis lia patro — ne allogis la junulon, tial en 1840 li forveturas per ŝipo al Ameriko, kie li komencas planen de aventuroj vivon, praktikante diversajn profesiojn. Li estis

aktoro, instruisto, komercisto, ĵurnalisto, militisto. Li partoprenis la militon inter Usono ka Meksikio en 1846—1848.

En la armeo li estis fama per siaj braveco, beleco kaj majstreco de rajdisto. En iu artikolo oni priskribis lin kiel „miksaĵon el Adoniso, Apolono kaj la Centaŭro“. Li estis nobla, brava, flama, energi plena homo, ĉiam preta starigi defende al la subpremata justeco, entuziasmulo de la libero, malamiko de reakciuloj. Kiam la angla burĝa gazeto „Times“ publikigis materialojn kun kalumnioj kontraŭ la eminenta hungara politika aganto, batalanto por la sendependeco de Hungario Lajos Kossuth, Mayne Reid verkis vicon da artikoloj, en kiuj pasie — li ĉion faris pasie — refutis la kalumniojn.

En 1849 li kun grupo da amikoj revenis en Eŭropon por helpi la revolucion, sed tiu ĉi helpo malfruiĝis — intertempe la revolucia movado jam estis frakasita. Do ne estas strange, ke inter la nomoj de konataj reprezentantoj de la eŭropa demokratio, invitataj partopreni en Londono, la 27-an de februaro 1855 la mitingon dediĉitan „al la memoro de la granda revolucia movado en 1848“, vice kun la nomoj de Karl Marx, Hercen, Victor Hugo staris ankaŭ la nomo de Mayne Reid.

En 1850 aperis la unua romano de Mayne Reid. Depost tiam li dediĉis sian vivon al obstina literatura laboro.

De la virgaj stepoj de Nordameriko, kie tiam ankorau ne sonis lokomotivfajfjilo, kaj la neĝaj dezertoj de Kanado, la intrigo en la romanoj de Mayne Reid transiras en la arbarojn de Sudameriko, en la Sudafrikajn stepojn, en Himalaĵon, en la senfinan oceanan vastajon. Antaŭ ni estas vivanta geografia enciklopedio de nia planedo — tia, kia ĝi estis antaŭ pli ol cent jaroj. Bravaj kaj entreprenemaj ĉasistoj kaj naturamantoj vagas tra sovaĝaj kaj ne esploritaj lokoj, aventuroj sekvas unu post la alia. La leganto ekscias multajn interesaĵojn pri la besta kaj planta mondo.

Indigno kaj perfido interplektas en sian reton la heroojn, sed la energio, braveco kaj sinoferemo ĉiam venkas. La romanoj de Mayne Reid estas lecionoj de fideleco, amikeco kaj liberamo, de malamo kontraŭ la despotismo kaj tiraneco.

La verkisto, forpasinta la 22-an de oktobro 1883, postlasis pli ol 50 romanojn kaj novelojn, inter kiuj „La rajdanto sen kapo“, „La blanka militestro“, „La ora brakringo“, „Ĉasantoj de plantoj“, „Grimpantoj sur la rokoj“ k. a. Al liaj plej bonaj verkoj apartenas ankaŭ la romano „Oceolo, militestro de la seminoloj“. Temo de tiu ĉi romano estas la heroo rezistado de la indianoj — la unuaj, veraj mastroj de la Amerika kontinento, kontraŭ la kruda, rabista premo de la kruelej konkerantoj.

Ĉi-sube legu fragmenton el la romano.

VENĜO DE LA INDIANO

La indianoj viciĝis unu post la alia kaj, lokinte min inter si, tuj direktiĝis al la arbaro. Kiom mi povis juĝi, ni iris al la loko de la batalo. Nun regis silento, la militistoj ne plu eligis sian venkokrion. Baldaŭ ni atingis herbejon, kie estis instaligintaj la indianaj militistoj; ili estis proksimume cent personoj. Mi rekonis kelkajn militestrojn, inter ili estis ankaŭ Oceolo.

Ĉio ĉirkaŭe estis surverŝita per sango. Malor-

de kuŝis vundokovritaj kadavroj — terurplena esprimo glaciigis en iliaj okuloj, turnitaj al la luno. La homoj falis en tiaj pozoj, en kiuj trafis ilin la morto.

Nenio supernatura okazis ĉi tie. Ĉio estis klara. La mortigitaj militistoj apartenis al la gento de l'perfiduloj — adeptoj de Lustaago kaj de Omatlo. Oni kaŝe postsekvis ilin, atakis ilin survoje kaj post mallonga interpuŝiĝo venkis ilin. La pliparto da ili pereis en la batalo, nur malmultaj saviĝis. Kelkiuj, kune kun Omatlo mem, falis en kaptitecon kaj estis ankoraŭ vivaj.

Oni ne mortigis ilin tuj nur por transdoni ilin al morto ĉe pli solenaj cirkonstancoj — la militestroj, konforme al la kutimo kaj la leĝoj de sia popolo, volis ke la sorto de Omatlo estu difinita de juĝantaro.

La juĝistoj plenumis sian devon ne longe pripensante — ĉiuj tre bone sciis, ke Omatlo estas perfidulo. Kompreneble, oni rekonis lin kulpa, kaj li devis per la vivo pagi siajn krimojn.

La nura demando estis — kiu plenumos la ekzekuton? Tion oni devis decidi per voĉdonado.

Ĉiuj sciis pri la ĵuro donita de Oceolo, tial oni unuanime elektis lin, kaj Oceolo akceptis tion kiel sian rajton.

Kun glavo en la mano li proksimiĝis al la ligita kaptito. Ĉiuj vidis kiel levigis lia mano por doni frapon. Sed falinte, la klingo nur tranĉis la rimenojn, per kiuj estis ligita la kaptito. Kial Oceolo faris tion? Ĉu li deziris permesi al Omatlo fuĝi?

— Omatlo! — diris Oceolo, severe rigardante sian malamikon. — Iam oni konsideris vin brava homo. Vin estimis ĉiuj gentoj, la tuta popolo de la seminoloj. La blankhaŭtaj homoj subaĉetis vin kaj igis vin perfidi al la patrolando kaj al nia komuna afero. Kaj tamen vi ne mortos kiel hundo! Mi neniigos vin, sed mi ne volas esti murdisto. Mi ne povas levi mian manon kontraŭ senhelpa kaj nearmita homo, tial mi proponas al vi honestan duelon. Tiam ĉiuj vidos, ke venkos la vero. . . Donu al li armilon! Li sin defendu, se li povas.

Tiu ĉi neatendita propono estis renkontita per malaprobaj krioj. Sed ĉiuj vidis, ke Oceolo ne rezignos pri sia decido, tial neniu kontraŭstaris. Unu el la militistoj etendis al Omatlo tomahokon kaj glavon. Sammaniere estis armata ankaŭ Oceolo. Poste oni silente retirigis, kaj la malamikoj restis en la mezo.

La interpuŝiĝo estis mallonga kaj sangoverŝa. Preskaŭ tuj Oceolo forigis la tomahokon el la manoj de sia kontraŭulo kaj per fulmrapida frapo faligis lin teren. La venkinto kliniĝis super la venkiton, en liaj manoj fulmbrilis la glavo.

Kiam li rektiĝis, la klingo ne plu brilis sub la lunlumo: ĝi malheliĝis pro la sango.

Oceolo restis fidela al sia ĵuro — li trapikis la koron de la perfidulo.

* * *

Pli malfrue la blankaj homoj nomis tiun ĉi agon de Oceolo murdo. Tio ne estas justa — ja per la sama morto pereis ankaŭ centoj da aliaj tiranoj kaj perfiduloj.

Nur tiun oni povas nomi murdisto, kiu mortigas pro malnobla, memprofita celo. Oceolo tamen estis tute alia homo.

* * *

Tuj post la mortigo de Omatlo Oceolo proksimiĝis al mi kaj amike etendis al mi la manon. Mi estis feliĉa, akirinte denove lian amikecon. Li esprimis bedaŭron, dirante, ke mi estis vundita kaj militkaptita pro eraro. Poste li vokis iun el la militistoj kaj ordonis al li akompani min survoje al la fuorto.



ĈEĤOSLOVAKIO

Gejunuloj deziras korespondi kaj interŝanĝi spertojn pri la E-movado. Komuna adreso: Emil Cesak, Skalni 22, CS-312 11 Plzen.

Petr Chaloupka (27-jara), Stinadla 1064, CS-584 01 Ledec N. S. — kun ĉi pri (inter)lingvistiko, naciaj lingvoj, literaturo, historio, kolektas bk, diskojn, lumbildojn, librojn, fakajn artikolojn.

Nadežda Stočkova (33-jara invalido) Mirova 352, CS-542 01 Zakler — kun nefumantinoj kaj abstinenculoj el ĉi pri muziko, libroj ka.

GDR

Esperanta klubeto deziras ekligi leterkontaktojn kun lernejo, nomata „Karl Marx“. Adreso: AG Esperanto de 8. POS „Karl Marx“, 5060 Erfurt, Mittelhäuserstr. 25.

Bert Schumann (22-jara), 4500 Dessau, Karl-Hans-Str.-22 — kun subakvigantoj el ĉiuj landoj.

JUGOSLAVIO

Du fratinoj: Svetlana Stevanović (19-jara) kaj Ljiljana Stevanović (20-jara), ul. „Crvene Armije“ 66, YU-11300 Smederevo — kun ĉi pri ĉi.

Vesna Ilić (25-jara), ul. „Crvene Armije“ 61, YU-11300 Smederevo — kun ĉi pri ĉi, kolektas paperajn buŝtukojn, insignojn, bildkartojn kaj gramofondiskojn.

Nikolić Saša (12-jara knabo), Nušičeva 8/44, YU-11300 Smederevo — kun ĉi, kolektas ĉiuspecajn insignojn.

POLLANDO

Emilio Witwer, str. Oginski 5 B/2, PL — 75-410 Kašalin — kun ĉi pri ĉi.

Janusz Szszezanowski (instruisto en mezlernejo), ul. Sportowa 12, PL — 67-200 Glogow — kun ĉi pri sporto, kulturo, kutimoj en diversaj landoj, pri flauro kaj faŭno kaj pri moderna muziko.

Ronald Skalviciski (47-jara instruisto), skrytka 288, PL — 00-950 Warszawa — kun ĉi pri la E-movado kaj -literaturo.



FABELA ROKMONDO

Estas ĉarmaj naturlokoj, kiuj konsternas per sia beleco, ravas kaj inspiras. Tia unika loko estas la Belogradĉik-rokoj, kiuj estas unuj el la plej naturvidindaĵoj en Bulgario. Situantaj en la okcidenta parto de Antaŭbalkano (Nordokcidenta Bulgario), ili estas natura dekoracio de urbo Belogradĉik kaj aldonas al ĝi apartan ravon.

La pasintaj jarmiloj korodis la ruĝajn grejsajn rokojn kaj skulptis plej mirigajn formojn. En la rigidigitaj konturoj revivigas fabela mondo de homoj, bestoj, ŝtonigitaj arbaroj kaj antikvaj abismoj. Tiu vidaĵo elvokas ĉe ĉiu homa koro adoron. La naturo ĉi tie tuŝis kvazaŭ per sorĉa vergo la rokajn masivojn kaj skulptis el ili belegajn ŝtonkreaĵojn. La ĉizilo de la jarmiloj formis ankaŭ rokpalacojn, obeliskojn, staciojn, vazojn kaj fungojn.

La Belogradĉik-rokoj etendiĝas je ĉirkaŭ 30 km longeco kaj je 3 ĝis 5 km larĝeco. En iuj lokoj ili atingas altecon de 150 m. Laŭ ilia situo la rokojn oni povas dividi en kelkajn ĉefajn partojn. La unuaj rokoj leviĝas okcidente de Skarŝin-valetoj. La plej imponaj rokoj, kiujn la popolo personigis, troviĝas ĉirkaŭ urbo Belogradĉik: la „Madono“, la „Monahoj“, la „Ĉevalrajdanto“, la „Derviŝo“ kaj „Urso“, „Adamo“ kaj „Eva“, „Hajduko Velko“, la „Kastelo“, la „Leono“ kaj multaj

aliaj ŝtonverkoj ĉirkaŭ la Belogradĉik-fortikaĵo. Tria granda rokgrupo situas je 4 km oriente de la urbo. Plej impona ĉi tie estas la figuro de „Dinosaŭro“. La lasta granda rokgrupo estas ĉe v. Borovica, kie elstaras la rokoj „Pina ŝtono“ kaj „Abela ŝtono“. Tiu rokgrupo finiĝas ĉe „Fraŭlina roko“.

En la piedo de malfacile alireblaj rokoj levigis la Belogradĉik-fortikaĵo. Ĉi tie iam situis romia kastelo. Fine de 14-a jc la fortikaĵoj renovigis kaj plivastigis Ivan Stracimir — reĝo de la Vidina bulgara regno. Post kiam la otomanoj konkeris tiun parton de Bulgario, ili detruis la Belogradĉik-fortikaĵojn. Samloke sub otomana regado oni konstruis du fortikaĵojn: la grandan aŭ malsupran fortikaĵon kaj malgrandan aŭ supran fortikaĵon, kiujn kruta vojeto ligas al unueca komplekso, la t. n. Kaleto, kiu formas naturan tuton kun la rokoj.

En 1809 la fama hajduko Velko konkeris la Belogradĉik-fortikaĵojn kaj keikajn tagojn regis ĝin. En 1850 la fortikaĵo ludis negativan rolon en la frakaso de la Belogradĉik-ribelo kontraŭ la otomana regpotenco. En ties subterejoj estis malliberigitaj kaj torturitaj la gvidantoj de la ribelo. Poste oni ekzekutis la ribelulojn ekster la fortikaĵo. Hodiaŭ proksime al la ekzekutloko levigas monumento memore al tiuj batalantoj.

La Belogradĉik-rokoj ne estas randecaj, neglatigitaj ŝtonripoj, kiaj ordinare staras sur senarbaraj montdeklivoj, bluas sur montopintoj aŭ apogas riverbordojn. . . Ili estas zorgeme skulptitaj de la vento kaj suno, kvazaŭ ili estus stornitaj gigantaj fostoj, per kiuj frenezuloj iaj volis apogi la ĉielon. Ŝtonigitaj spiritoj, kiuj havas siajn nomojn, legendojn kaj sortojn.

Apud la rokgrupo de „Pina ŝtono“, inter senviva amaso malfermiĝas la energie pintforma profilo de viro kun kapoto kaj kapuĉo: la legenda „Hajduko Velko“, popola protektanto dum la otomana regado, embuskas karavanojn kaj persekutaĉmentojn, aŭ eble kontemplas la „Madonon“.

La „Madono“ plej longe tenas la atenton de la vizitantoj kaj ĝi estis plej ofte objekto de legendoj. Pri la „Monahoj“ ne estas legendoj, se ni esceptus la klaĉon, ke ili ekiris laŭ la spuroj de la „Madono“ kaj la malbeno de monaĥestro trafis ilin je spango de ŝia basko.

Ĉe ĉiu lumringo la figuroj ŝanĝiĝas, la bildo transformiĝas, aparte ĉe sunsubiro, kiam leviĝas ruĝstrioj, altiĝas ŝpinstoj, kreskas arbaro kvazaŭ el sub la tero kun timigaj ombroj, reĝisoritaj de la oblikva suno. Poste super la Belogradĉik-rokoj venas vidinda vespero, kiam la ŝtonurbo konturiĝas giganta kaj potenca antaŭ ol malaperi en la nokton.

La ŝtonurbo denove naskiĝas kune kun la tagiĝo. Aperas denove la „Madono“ kaj la „Lernantino“, altiĝas Hajduko Velko, denove rigardanta la vojon, ree aperas la „Urso“ kaj, dorse al la sundisko, estas ekaŝonta en la nova tago. Kaj la vivo de la ŝtonurbo denove komenciĝas kun konstante ŝanĝigantaj humoroj, kun la kaprica inspiranta ludo de la helo-ombroj, kreantaj tiun unikan belecon, kiu igis la ĉefan scienciston prof. Konstantin Ireĉek diri: „Ne, ne, tion ĉi oni per vortoj ne povas priskribi!“

Evgeni GEORGIEV

Ĉefredaktoro: Donĉo ĤITROV
Vicĉefredaktoro: Ĥaim LEVI
Respondeca sekretario: Lidia RAEVA
Redakta komitato: Marin BĀCEV, Vasil BOROVIANSKI,
Dimitar ĤAĜIEV, Krĉstju KARUCIN.

Administranto — Asen Josifov

Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1919,
distingita per ordeno „Cirilo kaj Metodjo“ — I grado.
Eldonkvanto 6500.

Adreso de la redakcio:

„BULGARA ESPERANTISTO“
Bul. Ĥristo Botev 97 P. K. 66
1303 Sofio, Bulgario 1 000 Sofio
tel. 31-70-19
Ŝtata presejo „Georgi Dimitrov“, bul. Lenin 117